

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA sed ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. NOVA SISTEMO DE DISSENDADO DE ĈEA-RETKOMUNIKOJ
2. VENU AL LA SOLENAĴO DE CENTJARIĜO DE ESPERANTO EN PARDUBICE
3. NOVAJ ESPERANTIGITAJ RETPAĜAROJ
4. TRADUKGRUPO FONDATA
5. HELPU NIN PRETIGI JUBILEAN ASOCIAN DVD-on!
6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS. (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)
7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

1. NOVA SISTEMO DE DISSENDADO DE ĈEA-RETKOMUNIKOJ

Lastajn du numerojn de ĈEA-retkomunikoj multaj de vi ne ricevis. Laŭ la esploro ĉe parto de vi preskaŭ duono de tiuj, kies retadreso troviĝas en la dissendolisto. La precizan kialon ni ne konas, sed ni supozas, ke pro la sistemo de kaŝitaj retadresoj ĝi povis esti ĉe iuj provizantoj konsiderata spamo kaj tial forigita. Pro tio ni ŝanĝas la sistemon kaj uzas por la dissendo programon, kiun preparis Marek Blahuš (al kiu mi pro tio publike dankas). Ĝi forsendos la retmesaĝon individue al ĉiu retadreso, do vi devus vidi en la linio „Al kiu“ nur vian retadreson. Espereble tio helpos. Ĉar temas nun pri la unua uzo de tiu programo (provita sukcese nur kun malmultaj retadresoj): se estos iuj problemoj kun ĝi, mi petas anticipi pardonon. Sed ni kredu, ke ekde nun la Retkomunikoj atingos vere ĉiujn interesatojn.

2. VENU AL LA SOLENAĴO DE CENTJARIĜO DE ESPERANTO EN PARDUBICE

La 3-an ĝis 5-an de julio aranĝas Esperanto-klubo de doktoro Schulhof en Pardubice Internacian renkontiĝon omaĝe al centa datreveno de la klubfandiĝo. Ĝi okazos en la komplekso de Konstru-lernejo en Pardubice-Rybitví. Aliĝu tuj, ankoraŭ estas kelkaj liberaj 2-3 litaj ĉambroj. Kiu partoprenos nur en la solena tago (4.7.de la 9-a), anoncu por mendi la tagmanĝon kaj vespermanĝon.

La aliĝilon elŝutu rekte ĉe <http://www.volny.cz/aei-ikeh/Invitilo-al-100-jaroj-EK-Pardubice.pdf>, aŭ aliĝu pere de ret-adreso nechvilep@seznam.cz, aŭ aei-ikeh@volny.cz, aŭ telefone al Pavel Nechvíle 737 606 559 (vespere).

3. NOVAJ ESPERANTIGITAJ RETPAĜAROJ

En Esperanto-versio nun ekzistas oficiala turisma retpaĝaro de la urbo Písek www.icpisek.cz kaj retpaĝo de Arkeologia parko en Netolice www.archeopark-netolice.cz. Viaj favoraj reeĥoj ĉe la

administrantoj estas tre bonvenaj! Ĉu ankaŭ vi ne volas provi traduki pliajn similajn retpaĝojn, efike montrantajn al la publiko vivantecon kaj utilecon de Esperanto? Fariĝu membro de la nove fondata tradukgrupo (vidu pli sube).

4. TRADUKGRUPO FONDATA

Estas kreata retgrupo de interesiĝantoj pri tradukado al Esperanto, precipe pri ĉiĉeronaj kaj turismaj materialoj, kun celo de reciprokaj konsultiĝoj, okazigo de lingvotrejnado, preparo de instrumaterialoj (faka vortareto, ekzercaro) kaj kunordigo de tradukendaj tekstoj.

Bv. aliĝi ĉe etradukado@esperanto.cz PaDv

5. HELPU NIN PRETIGI JUBILEAN ASOCIAN DVD-on!

En la preparata DVD omaĝe al 40jariĝo de ĈEA devintus aperi plej valoraj atingiĝoj de nia E-movado dum tiu periodo. Serĉatas kvalitaj tekstoj (instrumaterialoj, beletro, faka literaturo, gazetatikoloj, ĉiĉeronaj materialoj), muzikaĵoj (tekstoj, muziknotoj, registraĵoj), sondosieroj, fotoĵoj el gravaj aranĝoj aŭ de gravaj esperantistoj, mallongaj videofilmoj. Ni krome bezonas kunlaborantojn por enkomputiligo de materialoj (skanado, retajpado, kontrollegado, transformo de kasedoj). Limdatoj por unua versio (internacieca), destinita por UKo, estas „tuj“, por la dua versio (enhavonta ankaŭ materialojn de enlanda, resp. regiona signifo) prezentota dum la ĈEA-konferenco en Svitavy, estas 9.9. !

Kontaktadreso: datumbazo@esperanto.cz

Antaŭdankas ĉefredaktoroj Miroslav Malovec kaj Pavla Dvořáková

6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS

(OFICIALA ORGANO DE ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) kun GEJ kaj PEJ arde preparas la 65-an Internacian Junularan Kongreson en Liberec'. Jam aliĝis 354 homoj el 49 landoj, la retpaĝaro <http://ijk.esperanto.cz> ekzistas en 4 lingvoj (eo, cs, de, pl) kaj en la LKK anas 23 personoj el kiuj 6 estas ĈEJ-anoj.

Marek BLAHUŠ kaj Vít MIŠUREC ĉeestis aprile Sablan Printempon en Písek kaj Tutslovakian renkontiĝon en Dobrá Voda. Paske Marek, Bára ZÁVODSKÁ kaj Standa ŠTOČEK celis la IJF-n en Italio, sed tiu tagon antaŭe nuliĝis pro tertremo, Bára rezignis kaj la knabojn akceptis en Bolonjo ĈEJ-anino Alla KUDRJAŠOVA. En Romo Marek kun aliaj esperantistoj dum la papa beno Urbi et Orbi aperis televide kun paneloj konsistigantaj la vorton "ESPERANTO". Maje 6 ĉeĥoj vizitis Eŭropan/Germanan Esperanto-Kongreson en la esperanto-urbo Herzberg am Harz.

5-an de aprilo 2009 festis ĈEJ 100-an aliĝinton: Michal MATÚŠOV, slovako kiu septembre ekstudos en Brno. En Ĉeĥio jam ekloĝis franco Emmanuel BOSQUET kiu vizitis klubojn de ĈEJ kaj irlandano Benio LEWIS. Ambaŭ ĉeestos la IJK-n. Pri ĝisnuna ĈEJ-agado informas paneloj en la esperanto-muzeo en Svitavy, inaŭguritaj ĉeeste de Dan MRÁZEK jam marte.

Pro financa krizo bedaŭrinde Josef VOJÁČEK ne plu instruos esperanton ĉe la universitatoj en Brno kaj Olomouc. Ĝus finiĝintan daŭrigan kurson, vizititan aprile de ĈEJ-representanto, partoprenis en Brno 11 studentoj. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈEĤIO AŬ ORGANIZATAJ DE ĈEĤIO

13.6.2009: Renkontiĝo en la regiono de la reĝo Ječmínek, kastelo Chropyně, info:

tonda.krejcir@seznam.cz

13.6.2009: MUZEA NOKTO en Esperanto-Muzeo en Svitavy. La konatan "Muzean nokton" (senpagan enireblon en muzeojn ĝis noktaj horoj) unuan fojon partoprenos ankaŭ Esperanto-Muzeo en Svitavy. Okazos projekciado, duonhoraj enkondukaj kursoj de Esperanto, muzika programo, kaj aliaj allogaĵoj por la vizitantoj. Krom lokuloj estos je dispono al vizitantoj vicprezidanto de ĈEA Petro Chrdle kaj ĈEJ-prezidanto Marek Blahuš. Info: Libuše Dvořáková <dvor.libuse@seznam.cz>

3.-5.7.2009: Internacia renkontiĝo omaĝe al la centa datreveno de la fondiĝo de Esperanto-klubo de doktoro Schulhof kun jarkunveno de AEH-IKEH en Pardubice. Info: nechvilep@seznam.cz

5.7.-18.7.2009, 19.7.-1.8.2009, 2.8.- 15.8.2009: tri etapoj de Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. Info: www.set-lancov.cz aŭ info@lancov.cz

18.-25.7.2009: 65-a Internacia Junulara Kongreso kun la temo "Libereco", Liberec, Inf.: ijk@esperanto.cz <http://ijk.esperanto.cz/>

25.7.-1.8.: Universala Esperanto-Kongreso en Bjalistoko (PL): informoj: josef-hron@volny.cz

22.-29.8.2009: EKOTUR - Tradicia internacia ekoturisma renkontiĝo por biciklantoj kaj piedturistoj. Svitavy, info: www.kava-pech.cz/ekotur aŭ chrdle@kava-pech.cz

12.(-13.)9.2009 LA 3-A POSTFERIA RENKONTIĜO - ĈI-JARE EN NETOLICE
Lingvokleriga programo, vizito de la muzeo kaj de la kastelo Kratochvíle en akompano de Petro Vok, kantvespero. Pli da informoj en www.esperanto.cz, Kontaktadreso: Turk.V@seznam.cz

9.-11.10.2009: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy, kun (interalie) inaŭguro de ja tria ekspozicio en la Esperanto-Muzeo. Aliĝiloj ĉe www.esperanto.cz Info: tomecek@esperanto.cz

12.-18.10.2009: InPaSem - Internacia Paroliga Semajno. Kurso por komencintoj kaj seminarioj por jamaj parolantoj. Dobřichovice. Info: chrdle@kava-pech.cz

7.-14.11.2009: Terminologia Seminario en Dobřichovice: ATENTU!! La antaŭanoncita seminario devis esti NULIGITA pro teknikaj kialoj. Ĝis nun neniuj aliĝis, sed bv. scii ke ĝi ne okazos kaj ne aliĝu. Espereble ĝi estos organizita iam en proksima estonteco.

12.12.2009 AnkRo (Antaŭkristnaska renkontiĝo) en Písek, ĉi-foje omaĝe al la 150-jariĝo de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof. Info: esperanto.pisek@seznam.cz

10.-25.7.2010: Flugkaravano al Kubo (UK en Havana, kun turisma ekkona antaŭkongreso). Info: chrdle@kava-pech.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed vin mem kaj sendu la informojn al la redaktanto de ĈEA-retkomunikoj chrdle@kava-pech.cz